

# REVUO

Monata Aldono al Esperanto Triumfonta

NUMERO 6

1923

APRILIO

Monumenton al la *Majstro*! Depost la kongreso de Praha, tiu alvoko iras tra la Esperanta gazetaro, tra la grupoj, tra la tuta samideanaro. Laŭta, energia, insista, kaj ĉiam plifortiganta. Multaj samideanoj jam respondis al ĝi, pli multaj silentas ankoraŭ. Sed kiu volos postresti, kiam la demando estas pri honoro al tiu homo, kiu donacis al ni la gravan *kulturan verkon de internacia lingvo*, kiu dediĉis sian tutan vivon por la interamarkigo de l' homaro! Ne monumenton grandiozan ni projektas kaj admirotan de ĉiuj kaj ĉiaj pasantoj — tiajn poste konstruos al li la popoloj, la urboj, la vilaĝoj sur grandaj publikaj placoj, en vastaj verdaj parkoj —, sed modestan tomboŝtonon, mediteme rigardotan nur de kvietaj kaj piemaj vizitantoj de la Urbo de l' Paco. Tamen indan. Ĝis nun la tombon de l' *Majstro* signas nur simpla, ja tro simpla tabulo. Ĉirkaŭas ĝin pompaj kaj altaj ŝtonoj sur tomboj de homoj pli-malpli sensignifaj por la homaro. Pompa kaj alta ne bezonas esti la ŝtono por la *Majstro*, modesta dum sia tuta vivo; sed inda ĝi devas esti je lia nobla spirito, je lia varma koro, je lia homarana vivo, je lia granda kultura verko; inda je la Esperanta movado,

kiu jam disvastiĝas tra la tuta mondo; inda je ni mem, kiuj pretendas esti pioniroj por la granda kultura ideo de lingvo internacia.

Multaj el ni kredeble ne konsentas kun ĉiuj ideoj de la *Majstro*, admiras lian genion, kiu elpensis tian mirindaĵon, sed malaprobas la „internacian ideon“, kiun li ligis kun Esperanto; aliaj simpatias al la *homonismo* predikita de li sed opinias malbone por la movado intermiksilingvon internacian kaj homonismon antaŭ la publiko. Tamen ni ĉiuj devas senhezite konfesi, ke li estis vere granda homo, ke lia spirito estis genia, liaj intencoj puraj, lia amo al la homaro senkompara. Tial ankaŭ ni ĉiuj senhezite alportu nian ŝtoneton por konstrui la unuan monumenton al la *Majstro*.



Projekto de Momento.

(1-a premlo.)

Tio estas *nia devo*.

Precipe en nuna monato ni memoru pri nia devo al la *Majstro*. La 14-an de aprilo 1917 D-ro Zamenhof fermis siajn okulojn por eterna dormo, kiam terurega milito skuis la mondon. Ses jaroj pasis de tiu tempo. Fariĝis *paco*. Sed la homaro ankoraŭ ne retrovis sian kvieton. La pli ol kvarjara mondmilito, revolucioj, malsato, valutaj mizeroj, bataloj pro ekonomiaj profitoj, eĉ novaj militoj tiel eks-



# Por Memoro de l' Majstro.

*Li jam ne ekzistas, sed lia spiriĵo  
Regadas en nia medio;  
Memoris ni lin dum la sanga milito,  
Dum bruo de l' revolucio.*

*Ni gardu eterne en nia memoro  
Kreinton de la Esperanto,  
Kaj fluu majeste kaj laŭte en ĥoro  
La sonoj de tiu ĉi kanto!*

*Sur nia standardo verdiĝas la stel',  
Gvidante la tutan homaron  
Al bela, de li starigita la cel',  
Montrante la vojon trans maron.*

*Kaj ŝtonojn subakvajn kaj batojn de  
Evitas la ŝip' „Esperanto“: [l' vent',  
Ĝi estas gardata per la testament'  
De sia genia gvidanto.*

*Al ni ja, anstataŭ postmorta donaco  
Li donis potencon rimedon,  
Por ĉiam konservi nin kontraŭ mal-  
La amon, esperon kaj kredon! [pac':*

Petrogrado, la 14-an de aprilo 1921.

*Kaj tio, pro kio fariĝas ribelo:  
Frateco, egaleco kaj libereco, —  
Sen sanga batalo povas esti nun celo  
De ĉiuj popoloj de l' tero.*

*Li ĉiam predikis la pacon de l'  
Jen senco de la testamento; [mondo,  
Memoru do ĉiam pri ĝi nia rondo  
Memoru pri nova la sento!*

*Neniam alvokis li nin al milito,  
Al glavo nur sangsoifanta, —  
Kaj do la predikojn de l' nobla spiriĵo  
Memoru la mondo Esperanta.*

*Ne kredu, se oni parolas al ni,  
Ke estas la Majstro mortinta;  
Ĉar morti ne povas potenca geni,  
Al ni Esperanton doninta.*

*Kaj tial anstataŭ la larmoj kaj ploro,  
Anstataŭ senfrukto sopiro,  
Ni donu al ni la promeson en koro:  
La Majstrajn predikojn postiro!*

V. N. Devjatnin.

## La fromaĝa supo.

Rakonto de Daudet.

Jen malgranda ĉambro en la kvina etaĝo, unu el tiuj mansardoj, sur kies fenestrojn rekte falas la pluvo, kaj kiu — je noktigo kiel nun — ŝajnas perdiĝi kun la tegmentoj en la malhelo kaj en la ventego. Tamen la ejo estas bona, komforta, kaj enirante oni ekhavas nedifineblan senton pri bonfarto, kiun ankoraŭ pligrandigas la bruo de la vento kaj la pluvotorentoj fluantaj en la defluilojn. Oni kredas troviĝi en nesto tre varma sur la plej alta supro de granda arbo. En ĉi tiu momento la nesto estas malplena. La mastro de la loĝejo forestas; sed oni sentas, ke li baldaŭ re-

venos, kaj ĉio en lia hejmo ŝajnas lin atendi. Sur vigla fajro kovrita, viando en poteto trankvile bolas kun murmuro pro kontento. Jen maldormado iom malfrua pro viandujo; kvankam laŭŝajne tute destinita al tiu agado (rigardu ĝiajn flankojn fajrumitajn, nigritajn per la flamo!), de tempo al tempo ĝi malpacientiĝas, kaj ĝia kovrilo leviĝas movate de la vaporo. Tiam varmokvanto rapide puŝata surpriras kaj etendiĝas en la tuta ĉambro.

Ho! la bonodoro de fromaĝa supo!... Kelkfoje ankaŭ la fajro kovrita sin iom liberigas. Falo de cindro ekestas inter la

ŝtipoj, kaj flameto ombrokuras sur la planko, heligante la loĝejon el malsupre, kvazaŭ por ĝin inspekti, certiĝi, ke ĉio estas laŭorda. Jes, vere! ĉio estas bone laŭorda, kaj la mastro povas veni, kiam li volos. La kurtenoj el Algeria teksaĵo estas kunfiritaj antaŭ la fenestroj, drapiritaj komforte ĉirkaŭ la lito. Jen malsupre la granda apogilseĝo etendiĝas apud la kameno; la tablo estas aranĝita en angulo, kun la lampo preta por esti eklumigata, la manĝilaro estas metita por unu, kaj apud la manĝilaro kuŝas la libro, la akompananto de la soleca manĝo. ... Kaj kiel la poteto havas difekton per la fajro, tiel la floroj de l' vazo estas paliĝintaj en la akvo, la libro ĉifita je la randoj. Ĉi ĉio havas la aspekton de hejmeca, longedaŭra kutimo. Oni sentas, ke la mastro de la loĝejo revenas verŝajne tre malfrue ĉiunokte, kaj ke li revenante trovas volonte tiun ĉi vespermanĝeton, kiu ankoraŭ boletas kaj konservas la ĉambron parfumita kaj varma ĝis lia reveno.

Ho! la bonodoro, de fromaĝa supo!...

Vidante la beletecon de tiu ĉi fraŭloĝejo, mi imagas oficiston, unu el tiuj akuratemaj estuloj kiuj transigas en sian tutan vivon la ekzaktecon de l' ofica horo kaj la ordon de la kestoj etiketumitaj. Ĉar li revenas tiel malfrue, verŝajne li havas servon en la poŝtejo aŭ en la telegrafejo. Tie mi vidas lin post krado, kun manikoj brilsilkaj kaj kepo, disspeciganta, stampanta leterojn, devolvanta la bluajn banderojn de la depeŝoj, preparanta al la Parisanoj kiuj dormas aŭ amuziĝas, iliajn tutajn aferojn morgaŭajn... Tamen eble ne. Ĉar jen, dum kiam mi traspionas la ĉambron, la brileto de l' fajrujo ekheligas grandajn fotografajojn pendantajn je la muro. Tuj oni vidas elirantaj el la ombro, kadritaj en oro kaj majeste drapiritaj la imperiestron Aŭguston, Mahometon, Felikson\*), Romanan kavaliron, guberniestron de Armenio, kronojn, kaskojn, tiarojn, turbanojn, kaj sub tiuj ĉi kapornamaĵoj diversaj ĉiam denove la saman kapon solenan kaj rektan, la kapon de la ĉambromastro, de la feliĉa

sinjoro, por kiu zumas tiu bonodora supo kaj kviete bolas sur la varma cindro...

Ho! la bonodoro de fromaĝa supo!...

Certe ne! tiu ne estas poŝt oficisto. Li estas imperiestro, estro de l' mondo, unu el tiuj estuloj elektitaj de l' providenco, kiuj en ĉiuj teatrovesperoj tremigas la arkaĵojn de la „Odéon“, kaj kiuj bezonas nur diri: „Gardistoj! kaptu lin!“, por ke la gardistoj obeu. En tiu ĉi momento li estas tie malsupre en sia palaco je la alia flanko de la akvo. Kun la koturnoj sub la kalkanoj, kun la ĥlamido\*) sur la ŝultroj li vagas sub la portikoj, deklamas, faldas la frunton, sin drapiras je mieno enuema en siajn tragikajn bombastajn versojn. Estas efektive tiel malĝojige ludi antaŭ benkoj! Kaj la ejo de l' „Odéon“ estas tiel granda, tiel malvarma en la tragedi-vesperoj!... Subite la imperiestro, duonmortinte pro malvarmo sub sia purpurmantelo, sentas varmtremon kuranta tra sia tuta korpo! Liaj okuloj ekbrulas, malfermiĝas liaj nazotruoj... Li pensas, ke li reveninte trovas sian ĉambron ankoraŭ varma, la manĝilaron metita, la lampon preta kaj sian tutan hejmon bone ordigita, kun tiu burĝa zorgemo de l' komediantoj, kiuj en sia privata vivo kompensiĝas pro la scenejaj manieroj iom malordaj... Li vidas sin malkovranta la viandujon, pleniganta sian florteleron...

Ho! la bonodoro de fromaĝa supo!..

De post tiu ĉi momento li ne plu estas la samo homo. La rektaj faldoj de lia ĥlamido, la marmorŝtuparoj, la rigideco de la portikoj neniel plu lin ĝenas. Li vigliĝas, ludas kun pasio, rapidigas la agadon. Imagu! se la fajro estingiĝus tie malsupre... Ju pli la vespero progresas, des pli lia vizio proksimiĝas kaj al li donas vivecon. Miraklo! la „Odéon“ entuziasmiĝas. La malnovaj kutimaj rigardantoj sur la pargeto, ekvekite el sia rigideco, sentas, ke tiu ĉi aktoro estas vere grandioza, precipe en la lastaj scenoj. Estas fakto, ke dum la disvolvado, en la decidiga horo, kiam oni

\*) France: chlamyde, t. e. manklo de l' antikvaj grekoj.

\*) Personoj el francaj dramoj.

mortigas la perfidulojn, kiam oni edzinigas la princinojn, tiam la fizionomio de la imperiestro ekhavas belecon, serenecon malofte vidatajn. Ĉar lia stomako estas malplenigita per tiom da ekscitoj, bombastaj versoj, ŝajnas al li, ke li estas hejme, sidante ĉe sia tableto, kaj ke lia rigardo

iras de Cinna al Maksimus kun bonhumora rideto pro kortuŝo, kvazaŭ li jam vidus la beletajn blankajn fadenojn, kiuj etendiĝas je la fino de l' kulero, kiam la fromaĝa supo estos finkuirita, bone stufita kaj varma surtabligata...

El la franca lingvo trad. *Arnold Starke*.

## El la mondo de l' senvortuloj.

De *Emil Gârleanu*\*).

### La kapreolino.

Sur la grasa musko, varma kvazaŭ pelto de l' tero, la kapreolino kuŝas apud sia ido, kiu etendis la kapon kun la eta nazo velura kaj malseka, sur la dorson de sia patrino kaj kun fermitaj okuloj lasas sin dorloti. La kapreolino ĝin lekadas, kaj ŝia maldika lango malpeze altuŝas la molan, silkecan pelton de l' ido. La patrino ĝin rigardas kaj en ŝia vagema animo ekĝermas sento instiganta kompati la delikatan estaĵon, al kiu ŝi donis vivon, kiun ŝi nutris per sia lakto, sed de kiu ŝi devas disiĝi ĝuste hodiaŭ, ĉar de longe jam alvenis la momento de la debrustigo. Kaj tiel rigardante per okuloj dolorplenaj, el la brusto de l' kapreolino eliĝas bleko kvazaŭ sufokita de doloro; la ido malfermas la okulojn. La kapreolino ekkuraĝas, suprensaltas kaj ekiras al la lumigita rok-pintaro, por lasi ĝin tie memstare vagadi. Tie supre ĝi estos ŝirmita kontraŭ la malamika lupo kaj lerta ĉasisto, ĉar suriri la suprojn de tiuj krutaĵoj, nur ili — la kaproj — kuraĝas. Tie ĝi estos sendanĝera, kiel ĉe la patrino. Sed ĝis tie ili devas peniri tra lokoj danĝerplenaj. La kapreolino eksvingas la piedojn al fulma kurado, al saltoj vivriskaj, — por elprovi la povojn de l' ido. Kaj la kapreolido heroe ŝin

sekvas; tamen ĉe la saltoj kapturnigaj ĝi ekhaltas por momento, kvazaŭ flarante la abismon, poste ĝi denove ekflugas kiel sago kaj gaje blekante, ĝojplene danckuras per la piedoj maldikaj kiel liano.

Sed ili devas malsupreniri, por trapenetri arbaron kaj denove suprengrimpi al rokaro. La kapreolino ĉesas kuri; malrapide ŝi paŝas, singarde. Ĝi trakuras densejojn, herbejojn, poste subiras arkaĵon foliaran, fine tra laŭboj verdoplenaj, ĝis ŝi enpenetras la koron malluman, kiel infero, de l' arbaro.

Longe ili iris tiel, ĝis fine ili atingis senarbejon. La kapreolido vigle saltadante antaŭkuras. Sed sammomente la kapreolino ekhaltas, kvazaŭ pro antaŭsento hezitante. Antaŭ ŝi, el sub junipero, albrilis avida okulparo de lupo. Nur unu salto kaj la kapreolido estus disŝirita. Nun la kapreolino aŭdigas blekokrion profundan, korŝiran, kian ĝis nun ŝi neniam eligis kaj sin saltjetas en la mezon de la senarbejo. La lupo ekvidante la kaptaĵon pli valoran, forgesas la idon kaj rapidas al la kapreolino...

Sternite en sango, sur la tero, sub la dentegoj de l' rabulo, la kapreolino restas kun kapo returnita al sia ido. Kaj nur kiam tiu ĉi timiĝinte malaperas en la profundo de la arbaro, la kapreolino eksentas la doloron, kaj ŝiajn okulojn malklarigas la akvo de l' morto.

El la rumana originalo trad.  
*Tiberio Morariu*.

\*) *Emil Gârleanu* 1878—1914. Ĉi-jena skribaĵo de la talenta rumana verkisto estas el la serio de noveloj ĉarmoplene priskribantaj la vivon de la naturo.

**Donu vian parton por la monumento al nia Majstro!**

## Patrujo mia!

Ha, sub ĉielo luma kaj gaja  
 Patrujo mia!  
 Benita lando, land' urugvaja,  
 Ne en alia  
 Troviĝas tuta la ĉarmo via.

Atlanto blua kaj la giganta  
 Rivero-mar  
 Trenaĵon kisas de l' eleganta  
 Via talaro.  
 Vin lulas kantoj de la ondarol

Ĝardenoj, ĉie la bonodoraj!  
 — Jen arbaretoj  
 Kun neĝaj floroj kaj fruktoj ovaj;  
 — Jen riĉkoloraj,  
 Sovaĝaj arboj ĉe riveretoj;

Ŝajnante kvazaŭ de l' mar' la ondoj  
 Rigidigitaj,  
 Ondiĝas verdaj, malaltaj montoj,  
 Fojne kovritaj,  
 De l' bord' sur tuta la land' sternitaj.

Naturan herbon, riĉan je saloj,  
 Bestar' multnombra  
 Kviete manĝas sur kamp' senombra;  
 Kuras ĉevaloj,  
 Kaj ŝafoj serĉas la ombron de l' valoj.

Damcerv' rapidas, kaj sur altaĵo  
 Gracie haltas —  
 Ŝajnas sur luma ĉiel' pentraĵo —  
 Dum stutoj\*) saltas,  
 Forflugas trote tra la kreskaĵo, —

Ĉar, unukorpa kun ĵus dresita,  
 Vigla ĉevalo,  
 Jen algalopas, sen tim' je falo,  
 La bularmita  
 „Gaucho“ nia, la reĝ' de l' valo;

Al li obeas time la bestoj,  
 Li ĉevalviron  
 Sovaĝan dresas; ludas ĉe festoj  
 Sian akiron,  
 Kaj havas idojn en pluraj nestoj.

Kuraĝon grandan li montras, kiam  
 Vokas danĝero. —  
 Por vin defendi, nacia tero,  
 Li estas ĉiam  
 L' unua preta al vivofero!

— — — — —

De l' lando krono, vi, urbo bela,  
 Montevideo!  
 Argenta taso, pura kaj hela\*\*) —  
 Korbo miela,  
 Plena je suko de l' flor' — Ideo!

Ha, sub ĉielo luma kaj gaja  
 Patrujo mia!  
 Benita lando, land' urugvaja,  
 Ne en alia  
 Troviĝas tuta la ĉarmo via!

*Enrique Legrand, Montevideo.*

\*) ĉevalinoj. \*\*) Oni ĝenerale donas al Montevideo la nomon „facita de plata“, t. e. „argenta taso“.

## Hinda fabelo.

De Aug. Heyting.

Iam vivis bela reĝofilino, nomata Wathelda. Vidante ŝin, oni pensis ke ŝi devenas de la himno mem, kiu kantas la mondon, kiu plenigas je ekstazo la korojn kaj la kapojn de poetoj, kaj per siaj sonoj plivastigas ilian bruston. Ĉar ŝia voĉo estis kiel la muzikspiro, kaj la paŝado de ŝia delikata figuro tiel senpeza kiel la ŝvebo de la sunlumo super la tero. Ŝia milda kaphararo estis bruna kaj ondigata kaj, per longa rigardo al ĝi, oni jam sentis sian animon plenigata je granda kvieteco. Ŝia haŭto estis blanka, sed la ora lumo, lumiginte ĝin longatempe, donis al ĝi sian lumon; kiam radio tuŝis ŝiajn vangojn, la sango sub ĝi tremis kaj brilis. Ŝia koro estis plena, kaj per regula bato puŝis la bruetadantan sangon tra la vejnoj kaj

portis kun si ĉielan amon, kaj tiu ĉi varm-igis ŝian korpon.

Iam Wathelda renkontis malriĉan princon, Dajzati, kiu estis forlasinta sian patrujon, puŝata de nekontraŭstarebla aspiro; estis la deziro de lia animoritmo retrovi sin mem en alia formo; sed Dajzati ne tion sciis. Kiam li longe rigardis en la malhelajn okulojn de Wathelda, ŝajnis al li, ke li vidas la regnon de songoj kaj melodioj, kaj fine li vidis nur tiujn okulojn, kiuj plenigis ŝian vizaĝon. Kaj ŝi tremis sub lia rigardo, sentante je la unua fojo, ke amo estas tio, kio fluas tra ŝiaj vejnoj.

Ili vivis tiam multe da tagoj plene feliĉaj. Sed, auskultu, kio okazis.

Fariĝis mateno, kiam ĉio ŝajnis festi edziĝon, ĉar la tero estis ornamiĝinta per

siaj plej bonodoraj kaj ĉarmaj vestoj, la ĉielo brilis mirinde bele, kaj malproksime tra la kamparo disvastiĝis la mistera murmuro de la maro, akompanante la dancadon de la malpezaj ondetoj. Dajazati, malrapide reminte, forkondukis Wathelda'n, ĝis la bordo malaperis el la vido. Tiam li haltis. Wathelda estis endormiĝinta, kaj ŝia dolĉa spiro movis malforte ŝian bruston. Dajazati kliniĝis trans la boaton kaj longe fiksas la okulojn sur la ondiĝon de la maro.

Subite, dum li tiamaniere revetis, lian orelon atingis stranga murmuro, kaj fore sur la akvo li vidis, alproksimiĝantan rapide al li, nebulan blankaĵon. Iom post iom fariĝis pli klaraj la konturoj, kaj li ekvidis belan, blankan virinon en blanka konko, kiu per sovaĝa kurso ĵetis alt-supren la ŝaŭmon. Tio estis Razarinda, timata de ĉiuj. Teruro ekkaptis lin, sed li ne povis deturni de ŝi la okulojn, kaj dum ŝi, pli kaj pli alproksimiĝante, lin rigardis, li perdis la memoron kaj volon. Razarinda akviris pli kaj pli proksimen, ĝis ŝia konko tuŝis la boaton; tiam Dajazati sin levis, ĉar li sentis ŝian venkon per spirita devigo. Li malsupreniris al ŝi, kaj sin premis al ŝia brusto, sed tiu ĉi estis malvarma kiel marmoro, kaj li turnis siajn okulojn al la ŝiaj, sed tiuj ĉi estis senvivaj. La malforta konko rompiĝis, sed la potenco de la sorĉarto de Razarinda tenis lin ligita, kaj ili ambaŭ subakviĝis en la freŝajn profundaĵojn ĝis la fundo de la maro, kie nekonataj vegetaĵoj kreskis. Tie ili restis kaj daŭrigis ĉirkaŭpreni unu la alian. Dajazati sentis sin pli kaj pli penetrata per la malvarmo, lia spiro densiĝis, iom post iom ŝi elsuĉis per siaj okuloj lian animon el lia korpo; sed li ne moviĝis. Ĉar ŝi estis kiel araneo, teksanta sian retaĵon ĉirkaŭ lin.

Estis nokto, kiam Wathelda vekigis; la luno brilis arĝente kaj la steloj meditis senbrue. Milde ŝi malfermis la okulojn

kaj serĉis sian amaton, sed ŝi ne trovis lin. Ŝi ektimis kaj vokis lin laŭte kaj multfoje, sed ŝia voĉo perdiĝis en la murmuro de l' maro; nenia respondo venis. Ŝi deturnis sin, rigardis en la profundan akvon kaj ekploris mallaŭte.

Tiel ŝi faris kaj remis plorante tra la maroj, vivante per doloro kaj amo. Ofte ŝi silente lasis sin akviri kaj fiksas la okulojn malsupren, provante trovi la kadavron de sia amato, sed ŝiaj okuloj ne trapenetris ĝis la misteraj grotoj. Kaj, kie ŝiaj larmoj falis en la akvon, ili fariĝis perloj, kaj kiam tiuj ĉi atingis la fundon de la maro, konkoj saltis ĉirkaŭ ilin, por gardi ĉi tiujn pruvojn de pureco kaj fideleco. Du ŝirmantaĵ flugiloj ili estis, interne tiel belaj kiel la brilaj larmoj, sed ekstere malglataj kaj grizaj kiel la ĉirkaŭaĵo. Forlasita kaj sola suferis Wathelda; ŝia doloro estis kaŝata kiel tiuj perloj, disŝutitaj en la akvoj de la mondo.

Fine tamen ŝi venis sur la lokon, kie Dajazati estis subakvigita, kaj unu el ŝiaj varmegaj larmoj glitis laŭlonge de la brusto de Razarinda, kaj brulvundetis ĝin, tiel ke ŝi tremis kaj subite forflugis.

Tiam Dajazati sentis reveni la vivon en sin mem, kaj la ensorĉo ĉesis. Malpeza kiel alaŭdo li supreniris; sed la intensa lumo de la tago trafinte liajn okulojn blindigis lin, kaj li lasis sin kviete akviri, ne sciante kien. Wathelda lin ekvidis, kaj same kiel la unua sunradio subite flugas en malhelan kavernon, tra fendo, kiu de jaroj, estis akvemoligata, tiel la ĝojo eniris en ŝian animon. Kaj ŝi levis lin en siajn delikatajn brakojn, kaj per siaj dolĉaj manoj ŝi ŝirmis liajn okulojn, okulfiksante lin senĉese, por ricevi lian unuan rigardon.

Tra la akvo, malproksime kaj rapide, foriĝis ŝaŭmanta trenajo al la horizonto.

El la holanda lingvo tradukis  
M. Tyken.



## Al la revoj.

En la landon de Fantazio flugu, flugu vi, revoj maldolĉaj, sed belaj!

Reportu min al la pasinteco, al la pasintaj horoj, en kiuj koron mi havis kaj sentis... Reportu min al tiuj momentoj senrevenaj, en kiuj mia koro sentis doloron akran sed ĝuoplenan. Altiĝu super la prozon de l' vivo kaj ŝvebu ĉirkaŭ la feliĉo neniam atingebla, kaj igu mian koron krevi pro doloro, ĉar ĝi volupton al mi donas!...

Ho, maldolĉaj pasiaj rememoroj pri dolĉa pasinteco, ne forlasu min! Kunprenu min en la azilon vian! Vin mi benas, kvankam

miajn koron kaj animon vi vundas, venenas...

Sed via dolorigo estas agrabla kaj plezurdonna kaj nevertigeblan sopiron en la brusto vekas. — Belega estas via lando, Fantazio, ĉarmaj kaj ravantaj — viaj regn-anoj! Regno de eternaj vivo, ĝuo kaj doloro... Sur viaj flugiloj mi deziras flugpendi, kaj per ili bati la mizeron de l' vivo...

En la landon de Fantazio flugu, flugu vi, revoj maldolĉaj, sed belaj!

*Izrael Lejzerowicz.*

## Scienco.

### Stelo 1309.

Observante la stelaron „Orion“ ĉe klara vetero, oni povas ekvidi en la mezo de l' stelamasoj de galaksio („Lakta Vojo“) etan astron, kiŭ ricevis la nomon „stelo 1309“. P-ro V.S. Plasket, direktoro de la observatorio en Viktoria (Brita Kolumbio), asertas, ke tiu ĉi stelo, ĝis nun malmulte atentata, estas la plej granda astro de l' universo. Hazarde li kaptis kelkajn radiojn de tiu ĉi stelo per sia spektroskopo. Spektroskopo estas aparato, per kiu oni povas analizi la lumradiojn je iliaj elementoj kaj konstati, el kiuj materioj ili devenas. — La lumo de l' stelo 1309 vidigas la karakterizajn signojn de niaj konataj, plej varmegaj astroj. Per la spektro oni konstatas la ekziston de heliumo, azoto oksigeno kaj kalcio. Tio, kio ŝajnas esti unu stelo, en la realeco estas du grandaj formaĵoj, kiuj estas apartigitaj unu de l' alia „nur“ per interspaco de 90 milionoj da kilometroj; sed pro la granda distanco de la tero por nia okulo ili kvazaŭ kunfandiĝas je unu astro. La astra maso de l' stelo 1309 estas 160-foje pli granda ol tiu de l' suno, kaj la lasta estas jam 332 000-foje pli granda ol la tero. La temperaturo de l' stelo 1309 estas kredeble 17 000

gradoj +, kio donas al ĝi lumforton 12 000-foje pli intensan ol tiu de la suno. Se por komparo oni prezentus la mason de l' suno per unu Kilogramo, la pezo de l' nomita stelo estus 160 kg, kaj la maso de nia tero nur 3 miligramoj. La diametro de l' stelo estas laŭkalkule 28 milionoj da kilometroj (tiu de la suno nur 1,3 milionoj). La lumo trakuras la spacon de l' universo je rapideco de 300 000 km posekunde; tio estas pli ol 25 miliardoj da km porage kaj preskaŭ 10 000 miliardoj da km pojare. — La lumo de l' stelo 1309 bezonas plenajn 10 000 jarojn, ĝis kiam ĝi atingas la teron! Por la homa cerbo estas neeble havigi al si imagon pri la grandega distanco de tiu ĉi stelo ĝis la tero. La lumo, kiun la esploristoj nun observas per sia spektroskopo, eliris de la stelo en la spacon je tempo, pri kies historio ni homoj scias nenion. Eble la stelo 1309 pereis pro universa katastrofo jam antaŭ kelkmilo da jaroj.

La nuntempa homo opinias tre gravaj sin kaj siajn aferojn. Iom okupiĝante pri astronomio, li ekscius, kiom prava estis la antikva psalmisto, kiu kantis al Dio: „Kio estas la homo, ke Vi, memoras lin!“

*Kiuza.*